

# La Riverego

Montrealo-2020	2	Kongresa rezolucio	14
Komuna kongreso en Seatlo	5	Postkongresaj aventuroj	16
Tririverumi MeKaRe	5	Fundamentaj vortoj	21
Lingvaj paradoksoj de Kebekio	7	KER-ekzamenoj en Mtl	22
TAKE-9 en Kubo	10	Renkontiĝoj	24



**La plej granda Esperanto-festo: Montrealo-2020 !**

**105e Mondial d'espéranto : Montréal 2020 !**



Urbocentro (vido de la monto)



Malnova Haveno



Geja Vilaĝo

## Universala Kongreso : Montrealo-2020!

**110 jarojn post kiam Zamenhof vizitis Montrealon en 1910, nia urbo fariĝos la monda ĉefurbo de Esperanto kaj gastigos la 105-an Universalan Kongreson ! Montrealo estas konata pro diversaj gravaj eventoj : interalie, la Tutmonda Ekspozicio en 1967 (« Expo 67 ») kaj la someraj Olimpikoj en 1976, la klina turo de kies stadiono fariĝis unu el la simboloj de la urbo. Nun, ni bonvenigos la plej grandan Esperanto-eventon, la unuan fojon ! Planu vian vojaĝon jam nun por la festego de Esperanto : la Universala Kongreso en Montrealo en 2020 !**

### Multlingva kaj bonveniga

Kio apartas pri Montrealo ? Nu, ĉio ! Oni ofte nomas Montrealon la plej eŭropeca urbo en


Nordameriko, pro ĝiaj kulturo, arĥitekturo, kutimoj kaj lingvoj. Ĉu vi sciis, ke, post Parizo, Montrealo estas la plej granda urbo en la mondo rilate la nombron da denaskaj parolantoj de la franca ? La franca estas la ĉefa lingvo de la urbo kaj de la provinco, Kebekio – unika fakto en la kontinento ! La angla estas la dua plej parolata lingvo en Montrealo, sed oni ne povos paŝi eĉ kelkajn metrojn urbocentre sen aŭdi almenaŭ dekon da aliaj lingvoj. Montrealo ja bonvenigis homojn de diversaj etnoj, lingvoj kaj religioj, el ĉiuj anguloj de la mondo, kaj riĉiĝis kulture kaj gastronomie dank' al siaj novaj loĝantoj. Ankaŭ vi povos konatiĝi kun tiu diverseco promene tra pluraj etnaj kvartaloj de Montrealo kun famaj, tipe montrealaj, eksteraj kurbŝtuparoj kaj ĝardenetoj.

## La monto kaj la ponto


La nomo « Montrealo » devenas de la nomo « Mont Réal » – la « Reĝa Monto », kiu situas meze de la urbo kaj videblas de pluraj partoj de ĝi. La Reĝa Monto estas la plej granda inter multegaj montrealaj parkoj. Ĝi havas belan lagon kaj... jes, multegajn ĉarmajn sciurojn. La Reĝa Monto estas elstara loko por ripozi, sportumi, pikniki kaj preni belegajn fotojn kun vido sur la urbon kaj la majestan riveron Sankta-Laŭrenco, kiun en Kebekio oni nomas simple « la riverego ». La monto kaj la riverego ambaŭ estis ege gravaj por la indiĝenoj. En Montrealo troviĝas unua en la mondo ponto konektita al la interreto : la ponto Jacques-Cartier. Ĉiuvespere ĝin feste ornamas pluraj lumoj depende de la sezono, kaj krome, depende de pepaĵoj (mencioj, ŝatoj, ktp.) en Twitter, la lumoj iras pli rapide aŭ fariĝas pli grandaj.

## Ni kongresos urbocentre !

Nia kongresejo situos urbocentre, ĝuste en la koro de Montrealo, de kie vi povos piediri ĝis la riverego kaj atingi ĉiujn vidindaĵojn en la proksimeco piede, metroe, bicikle aŭ buse. La urbo havas komfortan grandon de ĉirkaŭ du milionoj da loĝantoj kaj proponas al la vizitantoj senliman kvanton da vidindaĵoj, kulturaj programeroj kaj manĝeblecoj. Montrealo estas hejmo de centoj da muzeoj, historiaj domoj, arĥeologiaj lokoj kaj artgalerioj, preĝejoj kaj katedraloj, kaj pli ol dek milionoj da turistoj venas viziti la urbon ĉiujare. La urbo aparte agrablas en aŭgusto : la temperaturo tiumonate estas 15–25 gradoj celsiaj, t.e. 60–75 gradoj farenhejtaj, proksimume. **Bonvenon al nia bela, bonvenigema, artema kaj sekura urbo por la plej granda festego en Esperantujo en 2020 !**



La Olimpika Stadiono



Ponto Jacques-Cartier



Oratorio Sankta Jozefo

## Ĉu vi sciis ke ?..



Montrealo estas inter la dek urboj, kie plej agrablas manĝi ekstere laŭ Frommer's gvidiloj.



La Montreala ĵazfestivalo estas unu el la plej famaj en la mondo (2 mln da vizitantoj jare).



La fama *Cirque du Soleil* naskiĝis en Kebekio (1984) kaj estas bazita en Montrealo.



La Montreala botanika ĝardeno estas Nacia Historia Loko de Kanado kaj estas unu el la plej gravaj botanikaj ĝardenoj en la mondo.



## « Konstruado kaj ĝuado de Esperanta komunumo » en Seatlo : aliĝu nun por la Komuna Kongreso !

*L'Association canadienne d'espéranto et Esperanto-USA vous invitent à leur congrès commun, qui aura lieu cette année à Seattle (état du Washington), du 13 au 16 juillet.*

**Kuniĝu kun Kanada Esperanto-Asocio kaj Esperanto-USA ĉi-somere, dum ni festas la lingvon internacian. Nia komuna Landa Kongreso okazos ĉe Seattle Pacific University (Seatla Pacifika Universitato) en Seatlo, Vaŝingtonio, Usono, de la vespero de vendredo, 13-a de julio, ĝis la tagmezo de lundo, 16-a de julio. Okazos programeroj por spertaj kaj novaj esperantistoj ; inter ili estos kaj prezentaĵoj, interagaĵoj kaj eĉ koncerto !**

Ni ĝojas anonci, ke Chuck Smith faros ĉefprelegon pri la kongresa temo, « Konstruado kaj ĝuado de Esperanta komunumo ». Kiel la kunkreinto de la Esperanta kurso de Duolingo kaj la saĝtelefona aplikaĵo Amikumu, Chuck nun estas inter la plej konataj figuroj en Esperantujo. En tiuj kaj aliaj entreprenoj, li enkorpigis la spiriton de la internacia lingvo, uzante ĝin por kunigi homojn. Prelegos ankaŭ D-ro Federico Gobbo, profesoro de la katedro Interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo, Nederlando.

Kio pri la pluvo ? Somere, Seatlo ĝuas veteron mildan kaj sunplenan ; la pasintan julion, oni registris neniom da pluvo. Ni planas profiti tion per ekskursoj dum la kongreso kaj per postkongresa tendumado en Mount Rainier National Park (Nacia Parko Monto Rajnero), 16-19-a de julio.

Ĉu al vi mankas monrimedoj ? Membroj de KEA ricevas rabaton por la kotizo, kaj Esperanto-USA, helpe de Esperantic Studies Foundation, subvencias indajn petantojn. Formularon por tio, plus provizora horaro, listo de aliĝintoj kaj aliĝilo, vi povas trovi ĉe nia retpaĝaro [landakongreso.org](http://landakongreso.org).

Ĉu vi volas kontribui ? Ni ankoraŭ serĉas prelegontojn, muzikistojn, gvidontojn de programeroj, kaj aliajn volontulojn. Sendu retmesaĝon al [seatlo2018@esperanto-usa.org](mailto:seatlo2018@esperanto-usa.org), se vi interesiĝas. Ĝis baldaŭ en Seatlo !



Nia kongresejo en Seatlo (foto : Jordon Kalilich)



## Venu Tririverumi MeKaRe !

**19-a ĝis la 21-a de majo 2018, Tririvero (QC)**

*La rencontre espérantiste du centre du Canada (MEKARO) se tiendra cette année à Trois-Rivières, du 19 au 21 mai. Info et inscription : [mekaro.ca](http://mekaro.ca)*

La Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto (MeKaRo) estas turisma semajnfino, kiu okazas ĉiujare, alterne en Kebekio kaj en Ontario, dum la longa semajnfino en majo, t.e., la semajnfino de la Tago Nacia de la Patriotoj en Kebekio kaj de la Viktorina Tago en Ontario. Ĝin organizas la Esperanto-Societo Kebekia kaj lokaj Esperanto-kluboj en Kebekio kaj Ontario.

Ĝis tiam !

Informoj kaj aliĝo : [mekaro.ca](http://mekaro.ca)



# Lingvaj paradoksoj de Kebekio



*Nicolas Viau*

*Nicolas Viau identifie quelques ironies et paradoxes liés à la situation linguistique du Québec, îlot de francophonie dans une Amérique du Nord majoritairement anglophone.*

**La lingva demando estas grava en Kebekio ekde la brita konkero antaŭ pli ol du jarcentoj kaj duono. Polemikoj, demandoj, streboj, kaj tiel plu daŭras ĝis la nuna epoko. Tute kompreneble, ĉar la lingva, kultura kaj historia situacio de Kebekio en tiu Nordamerika kunteksto estas klare aparta. Ankaŭ mi trovas, ke fakte nia situacio estigas kelkajn ironiojn aŭ paradoksojn.**

## **Kanada « revo » per Kebekia politiko**

La Ĉarto pri la franca lingvo (Charte de la langue française, t.n. « leĝo 101 »), kiu deklaras la francan lingvon la oficiala lingvo de Kebekio kaj devigas, interalie, ĉiudevenajn lernantojn studi en franclingvaj lernejoj (anstataŭ anglalingvaj, kie multaj migrantoj studis antaŭ la leĝo), paralele al fortigo de la franca lingvo kiel ĉefa komuna lingvo

en Kebekio diversmaniere, iel portis Montrealon ne al nura franclingveco, sed praktike kvazaŭ al la revo de Pierre Elliott Trudeau, ĉefministro de Kanado en 1968-1984 : politiko, kiu deklaras, ke la angla kaj la franca estu egalaj ĉie en Kanado, ĉiusituacie. Tion teorie sendependiĝistoj rifuzas, ĉar estas en Nordameriko granda malekvilibro inter la du lingvoj, do tutsimetria traktado ne taŭgas. Tamen, ĉar Montrealanoj ofte regas la anglan, la urbo estas unu el la solaj lokoj en Kanado, kie praktike eblas ricevi preskaŭ ĉiujn servojn ambaŭlingve. Mia impresio estas, ke tio ironie okazis ne pro politiko de P. E. Trudeau, sed pro la decidoj de la Kebekia registaro : de la PQ (Parti Québécois, Partio Kebekia) – provinca partio kiu advokatas por la sendependiĝo kaj kiu estigis la Ĉarton. Kebekio estas la plej dulingva provinco en Kanado. Multaj Montrealanoj parolas tri lingvojn aŭ eĉ pli.

## Kanada unueco

Plia paradokso estas, ke eble la Ĉarto iusence konservis la unuecon de Kanado post la du referendumoj pri sendependiĝo. Ĝi plialtigis la senton de sekureco de Kebekianoj pri lingvo kaj kulturo, kaj oni povas argumenti, ke tio, male, malaltigis la emon sendependiĝi. Eble sendependiĝemaj homoj estas eĉ en la realo la « veraj » federaciistoj ! La timo pri sendependiĝo de Kebekio kaj la politika premo de ĉiuj Kebekiaj registaroj helpis malcentrigi Kanadon, kaj tiel verŝajne igis ĝin pli-malpli akceptebla al granda nombro da Kebekianoj. Kebekio finfine estas la gardisto de veraj federaciaj principoj en Kanado – eĉ la PQ (iel nevole) – kontraŭ politika centriĝemo.

## Dulingva identeco de Kanado

Mi ankaŭ fakte aŭdis, ke ĝuste danke al Kebekio Kanado apartigas sin de Usono. Ekzemple, oni vidas tiun bezonon apartigi sin en la nuntempa

polemik(et)o pri tio, al kiu apartenas *poutine*, nia fama plado de terpomoj kaj saŭco : ĉu al Kebekio aŭ al la tuta Kanado ? Simboloj, kiel kastoro kaj acerfolio estas forte ligitaj al la historio de Nova Francio. Nova ironio, do : Kebekia kulturo forte difinas Kanadan identecon.



Dulingva stratsigno en Montrealo

Se dulingveco estas ero de Kanada identeco, tio ŝuldiĝas ĉefe al franclingva Kebekio : sen nia provinco temus ĉefe pri unulingva lando. Tion reasertis ankaŭ eĉ Justin Trudeau mem dum publika kunveno komence de 2018 : « Se ni volas, ke Kanado daŭre estu

dulingva lando, Kebekio devas ĉiam resti franclingva unue. » Tion li respondis al Brazildevena junulino, kiu parolis (france) pri la frustiĝo esti ofte alparolata anglalingve en Montrealo. Ofte tio ne okazas pro ili mem : pluraj frustriĝas, kiam foje homoj aŭdas akĉenton, kaj tuj pensas ke pli bone paroli angle. Kiel postuli de enmigrintoj paroli france se lokanoj ne alparolas ilin franclingve ? Kiel lerni, se oni ne povas sin ekzerci ? Fine, kiel integriĝi ? Ofte franclingvanoj



mem malhelpas tiurilate. Ni ne plu kalkulu la ironiojn !

## Lingvaj pontoj al la mondo

La fakto do restas : en Kebekio la defio estas unuigi ĉiujn ĉirkaŭ komuna lingvo : la franca. Homoj kompreneble parolas plej diversajn lingvojn, sed lingvon kaj kulturon oni fakte ne praktikas sole, sed komunume, pere de interago kun aliuloj. Pro tio lingvaj rajtoj estas ĉefe komunumaj : oni ne povas vivi tra lingvo, se ne estas homoj, lokoj, ktp. por paroli ĝin. Kaj tio estas, kion alportas Kebekio al Nordameriko : vera kultura diverseco, ne nur pro la diversaj devenoj de la civitanaro, sed ankaŭ ĝuste kaj ĉefe pro la fakto, ke dividi komunan kulturon, kiu estas malsama de tiu de la kontinento kaj kiu forte ligas ne nur homojn inter si, sed ankaŭ la provincon ankaŭ al aliaj mondopartoj. Kebekio ja bone konas la anglalingvan Nordamerikan kulturon, sed

ne nur tion : dekoj da landoj estas iel parto de franclingvujo.

Tiu « ponteco » estas strategia : pro tio oni konas nin ! Kial oni ne aŭdas tiel multe pri aliaj provincoj ? Pro la malsama lingvo kaj kulturo. Kebekianoj rigardas la mondon kiel franclingvaj Nord-Amerikanoj. Ambaŭ vortoj gravas. Ili konas kaj Captain-on America kaj Asterikson. Estas granda avantaĝo paroli unu el la ĉefaj lingvoj de la mondo krom la angla. Tion oni nur povas atingi emfazante la francan kiel publikan kaj laboran lingvon.

Al tiu lingva pontebleco Esperantistoj devus facile simpatii : ĉu nia lingvo ne estas ponto al la tuta mondo ? Senironie.

*La opinioj esprimitaj en tiu artikolo estas nur tiuj de la aŭtoro kaj ne tiuj de Esperanto-Societo Kebekia.*



# Ĝui Esperantujon Kube : Raporto pri la 9-a TAKE

*Zdravka Metz*

*Le 9-e Congrès d'espéranto des Amériques s'est tenu à la Havane en février dernier. Plus de 240 participants en provenance de 18 pays y ont pris part.*

En sabato, la 17-an de februaro 2017, finiĝis en Havano la 9-a TAKE (Tutamerika Kongreso de Esperanto), kiun partoprenis 240 esperantistoj el 18 landoj kaj el ĉiuj partoj de Kubo : de la plej fora Guantánamo kaj Santiago de Cuba, oriente ; de Holguín, Las Tunas kaj Matanzas, norde ; kaj de Cienfuegos kaj Trinidad, sude. Menciindas, ke krom la partoprenantoj el Azio kaj Eŭropo ĉeestis homoj el ĉiuj tri Amerikoj. Do la kongreso estis vere Tutamerika, despli en la jaro, kiam TAKE festas sian 40-an jariĝon, malgraŭ siaj nomoj, kiuj ŝanĝiĝadis de 1978, kiam okazis la unua tia

kongreso, tiam nomata Latinamerika Kongreso de Esperanto, en San-Paŭlo, Brazilo.

La temo de la ĉi-jara TAKE estis « Lingvoj kaj kulturoj : edukado por daŭripova evoluo en la Amerikoj ».

La aktualan temon oni diskutis en tri grupoj dum ĉiuj sesioj, por ke ĉiu povu esprimi sin parolante pri konoj kaj spertoj en siaj regiono kaj lando. Iom pli pri la temo kaj pri la decidoj vi povos legi post la fino de ĉi raporto, en la kongresa rezolucio.



Mi pasigis la kongreson ĉefe vizitante programerojn, krom unu posttagmezon, kiam mi

aliĝis al ekskurso kaj vizitis malnovan parton de Havano.

Du gravaj programeroj okazis kunlabore kun UEA :

- AMO-seminario (AMO = Aktivula Maturigo) por instrui aktivulojn kunlabori internacie, malfermaj al novaj ideoj kaj al influoj kaj tendencoj en la granda mondo. Estis invitataj 25 aktivuloj el la tri Amerikoj, por ke ili tiel spertiĝu kaj poste agu en siaj regionoj. Ĉeestis multaj esperantistoj el Kubo, ĉar tio estis bona okazo renkonti reprezentantojn de UEA kaj TEJO (tiuj estis respektive Sara Spanò kaj Francesco Maurelli).

- ILEI-ekzamenoj, al kiuj subiĝis multnombraj junaj kaj malpli junaj kubaj esperantistoj. La lastan tagon ili ĉiuj meritis sian diplomon.

TAKE pliriĉigis la ĉeestantojn per diverspecaj interŝanĝoj, ĉefe homaj. Oni povis aŭdi pri la kuba

kulturo : oni lernis pri la tradicia folkloro kuba muziko, kombinanta afrikajn kaj hispanajn influojn, pri la *treso* (hispane « tres » – muzika instrumento, simila al gitaro, havanta trioble du kordojn kaj sonanta alimaniere), kaj pri dancoj kaj kantoj. Prelego pri la *guayabera*, tradicia kamparana vestaĵo, fakte blanka ĉemizo,

komprenigis al mi, kial eĉ ordinaraĵoj kaj diverskoloraj ĉemizoj havas kvin vertikalajn faldetojn. La kvar poŝoj gravas, por ke ĝi aspektu pli kubeca ekde la jaro 1709. En la urbo Sancti Spíritus estas muzeo, en kiu, inter pli ol ducent ekspoziciaĵoj, troviĝas ĉemizo grandega kiel muro, jes, kudrita el blanka kotona tolaĵo,

same kiel tiu plej eta por unu-jara infano. Okazis dancateliero. Ne mankis informoj pri la sansistemo en Germanio, ginsengo, la eldonejo MAS (Monda Asembleo Socia), Yumeiho-terapio, origamio kaj ankoraŭ multaj aliaj temoj.



La programo, riĉa en have, ofertis foje tri samtempajn erojn, en tri lokoj, kaj mi devis elekti laŭ plaĉo kaj intereso inter prelegoj, prezentoj, atelieroj, filmoprezento, forumo, konversacia rondo. Preparita kvizo pri la historio de Esperanto konsistigis viglan kaj amuzan ludon. Prezentiĝis du kubaj amatoraj teatraĵetoj, unu pri la vivo de « Emelina », de Eugenio Hernández Espinosa, nuntempa dramisto. La alia titoliĝis « Francisca kaj la Morto », de Onelio Jorge Cardoso, elstara verkisto ; ĝi ridigis la publikon kaj eltiris longajn aplaŭdojn por la klubanoj, kiuj aktoris.

Inter la vesperaj programeroj estis la Interkona vespero,



Esperanto-kabaredo, kaj la Vesperoj Nacia, Baleda, Teatra kaj Adiaŭa. Ĉiuj distris la ĉeestantojn. Foje pro pluvo, foje pro fino de spektaklo disiĝis la homoj ĝuante esperantan kunvivadon de amikeco kaj frateco. Bone elektitaj kaj gviditaj komunaj programeroj instigis plenan partoprenon de la ĉeestantoj, kiuj recitis poemojn, rakontis aŭ legis anekdotojn, kunmuzikis, aŭ individue pianludis aŭ gitarludis. Tiel la programo estis plaĉa por ĉiuj kaj permesis ekkoni tiujn kaŝitajn talentojn, same kiel plezure travivi memorindajn momentojn en Esperantujo.

El foraj kubaj urboj venis duopo, La Fratoj El, kiuj repis Esperante.

Neesperantista bando,

Kialo, havis etan repertuaron en Esperanto. La grupo Amindaj preparis ferman koncerton. Ili dancigis ĉiujn laŭ kubaj ritmoj kaj kantigis la kanton Guantanamo. Eĉ la pluvo ne povis disigi la TAKE-anojn antaŭ la fino de la adiaŭa vespero.

Plezura por multaj estis la teatraĵo « La kredito » de Jordi Galceran, en kiu ludis Saša Pilipović kaj Georgo Handzlik. Ili ludis kaj aludoj sur la scenejo, en lingvo agrabla, komprenebla, ridigis la publikon, sed la fino de la spektaklo estis iom kliŝa, banala. Restas la demando : ĉu la esperantistoj ne preferus ĝui la lingvon sursceneje per pli originala, malpli ordinara temo ?

La organizantoj montris sian lertecon pri logistiko per la ĉiutaga transporto de eksterlandaj kongresanoj de la loĝkvartalo, kie situas Kuba Esperanto-Asocio, al la kongresejo matene kaj reen vespere. Tiuj kongresanoj certe ne forgesos la dimanĉvesperan, iom aventurec-aspektan revenon per malnovaj taksioj, kiuj sekvis unu la



alian. Du-tri-foja haltado timigis kelkajn aŭ ridigis kaj amuzis aliajn ; la kaŭzo estis, ja, manko de benzino ĉe du el la malnovaj aŭtoj. Certe tiuj homoj neniam forgesos tiun strangan, noktan veturadon.

TAKE-anoj partoprenis ekskursojn, plurajn duontagajn, kaj unu tuttagan al la Nacia Parko de

Viñales por vidi la valon kaj karstajn rondajn montetojn, kiuj famigis ĝin. Duontagaj vizitoj okazis ene de la urbo, por malkovri diversajn kvartalojn de Havano, rezidejon laŭ la vojo de E. Hemingway, por viziti la ĉinan kvartalon de la urbo, aŭ por informiĝi pri la universo de la *oriŝoj* (spiritoj), la tradicio de santerio (hispane

« santería ») kaj aliaj afrikdevenaj religioj.

Mi vojaĝis foren, kion pli mi diru ? En Havano, dum TAKE, mi trovis novajn, revidis multajn malnovajn geamikojn, kun kiuj mi povis dividi neforgeseblajn momentojn, dirante al mi mem : jes, indus vojaĝi por tiu bela renkontiĝo.

## 9-a Tutamerika Kongreso de Esperanto : Rezolucio

La kongresa temo de la 9-a Tutamerika Kongreso de Esperanto havis entute kvar sesiojn. Unue okazis enkonduka prezento dimanĉe la 11-an de februaro. Tri demandoj estis starigitaj por pridiskuto en la dua sesio : Kio estas daŭripova evoluo ? Kiel eduki infanojn kaj gejunulojn por daŭripova evoluo ? Kiel rolas la lingvo en la edukaj procezoj ? Oni diskutis tiujn demandojn en tri subgrupoj, kiuj interŝanĝis argumentojn kaj prezentis raportojn pri siaj diskutoj, kiuj ĉefe rilatis al la nuntempaj problemoj pri la edukado al infanoj.

Oni konstatis, ke tra la tuta mondo estas similaj problemoj kaj defioj pri protektado de infanoj, pro la abundo de perforto en la amaskomunikiloj, interreto, la situacio en lernejoj kaj edukado hejma ; oni esprimis zorgojn pri kiel protekti la naturon ; pri nebonaj kondutoj tiurilate ; kaj en la tria demando oni skizis la esencan rolon de lingvoj en la edukaj procezoj.

Du pliaj demandoj estis starigitaj por pridiskuto en la tria sesio : Kion vi scias pri la lingva situacio en Ameriko kaj aparte pri indiĝenaj lingvoj ? Kiel ni esperantistoj povas kontribui per la lingvo

Esperanto al daŭripova edukado ?

En la tria sesio okazinta en mardo, la 13-an de februaro, la kongresanoj laboris grupe kaj raportis pri la situacio en Kanado kaj Mezameriko, kaj oni ankaŭ interparolis pri la situacio en Kubo kaj la lingva heredaĵo de la indiĝenaj praloĝantoj.

Oni raportis pri projektoj en Amazonio koncerne protektadon de aŭtoktonaj lingvoj kaj ankaŭ pri la bezono ke la Movado engaĝu sin en konkretajn projektojn de la lokaj komunumoj por protekti la medion, arboplantadon ; ligi sin al tiuj grupoj, kiuj prezentas bonan ŝancon por kunhelpi, ke la infanoj, gejunuloj kaj ties gepatroj estu edukataj konsidere al la bezonoj de la homoj kaj la naturo.

Oni proponis por la fina sesio esplori la eblecon engaĝi sin per konkreta agado en la komunumo, kiu povus montri ke la esperantistoj prizorgas tiujn ĉi temojn kaj pretas kunlabori.

Tempomanko malebligis aranĝi ion tian, tamen ni konsideras, ke estas tre bona ideo planinda por estontaj tiaspecaj aranĝoj en la koncernaj loĝlokoj. Oni parolis pri tio, ke en Kubo la esperantistoj siatempe provis kaj eĉ fondis grupon de naturamantoj kun kuba neesperantista

organizaĵo, sed la funkciado ne estis longdaŭra. Laŭ niaj spertoj pri similaj klopodoj, por ke tiaj kunlaboraj proponoj estu vere efikaj, ili devus fariĝi reciprokaj.

Ni povas resumi, ke la sesioj de la kongresa temo estis tre fruktodonaj kaj ilin partoprenis entute cento da kongresanoj, kiuj povis akiri pli da scioj pri la temo.

Kvankam la kongreso ne rezolucios pri la demando starigita de la kongresa temo, ni povas, per la formo de Principa Deklaro, renovigi la sintenon de la Esperanto-movado pri la temo :

Konfirmi ke la partoprenintoj de la 9-a TAKE emfazas la bezonon ke la Esperanto-komunumo pli proksimiĝu al la nuntempaj demandoj starigitaj en la Tagordo 2030 de UNESKO, pri kiu Kuba Esperanto-Asocio havas apartan intereson por labori cele al tio, ke niaj membroj kaj aktivuloj sentu, ke nia Esperantujo estas vera edukejo.

Ke nia edukejo unue celas disvastigi Esperanton kaj la konscion pri la valoroj de la lingvo kiel kultura trezoro por defendo de la gepatra lingvo.

Ke nia laboro ankaŭ celas la lingvan justicon, kiu kontribuu al lingva ekvilibro, kies sekvoj bone efikos al konservado de diverseco de kulturoj kaj mondovizioj, ĉar tia diverseco garantios pli bonan

kaj kvalitan vivon por la sano de nia planedo. Tiu estas edukaj bazoj por survoji al daŭrigebla evoluo, kiu kontentigu la bezonojn de la nunaj kaj estontaj generacioj.

Kiel ni povas efike kontribui ?

La respondo kuŝas en la ĉiutagaj agoj, kiujn ni povas entrepreni ene de niaj koncernaj komunumoj, provizante spacon por eduki unue nin mem cele al nova pensmaniero.

Ni vivas en unika planedo kaj ĝuas la privilegion posedi lingvon, kiu estas efike uzata por koni aliajn homojn, konstrui amikecon, dialogi surbaze de respekto al la homo kaj ties lingvo, kio estas ankaŭ respekti la kulturon de la aliaj, kaj kune kontribui por purigi nian medion, protekti niajn arbarojn, la marojn kaj riverojn, nian komunan domon, nian terglobon. Ĉiu eta paŝo al tiu celo estas ja tre pozitiva paŝo.

Dankon al ĉiuj, kiuj aktive partoprenis kaj nun reiras hejmen kun la konvinko, ke ni estas parto de tiu homaro, kiu konscie kontribuas kaj plu kontribuos al edukado por daŭripova evoluo.

Koran dankon!

*Maritza Gutiérrez González, Prezidanto de Kuba Esperanto-Asocio, Havano, 17/02/2018*

# Tra Kubo per Esperanto : postkongresaj aventuroj

*Zdravka Metz*

TAKE 9 (Tutmonda Amerika Kongreso de Esperanto) finiĝis la 17-an de februaro 2018, en Havano. Tuj post la fermo de la kongreso kaj post lasta fotado en la kongreseja hotelo Panamericano [panamerikano], komforta aŭtobuso atendis jam la 28 kongresanojn, kiuj estis pasigontaj semajnon vizitante kvar urbojn en centra Kubo. Ni ĉiuj jam konis nin bone fine de TAKE, ĉar ni kune vojaĝis uzante la saman buson al la kongresejo kaj reen al nia loĝkvartalo dum la tuta kongresa semajno.

Duonvoje, nia simpatia gvidanto Alberto proponis, ke la buso haltu en la regiono de Playa Girón [plaja ĥirón] kaj ke tie ni elbusiĝu kaj manĝetu dum kelka tempo. La nomo tuj vekis mian memoron pri la jaro 1990, kiam en Playa Girón nia familio partoprenis IJK-on. Tiame, ŝajnis al mi, ke ni longe vojaĝis ekde Havano, sed hodiaŭ la tempo pli rapide pasis.

La sabatan posttagmezon, ni atingis la 500-jaran urbon Cienfuegos [sjenfuegos], ĉe la suda bordo de Kubo, kaj tie, tre rapide po grupoj dividitaj, ni

ekloĝiĝis en privataj domoj, kaj iom poste ni jam renkontiĝis ĉe indikita proksima restoracio.

En la gastiganta familio ni ankaŭ matenmanĝis, sed la vespermanĝoj estis ĉiam komunaj en restoracio.

Estis planite, ke esperantistoj de la vizitataj urboj venu renkonti kaj gvidi nin por konatigi al ni la historion de siaj urboj. En Cienfuegos venis kvar geesperantistoj, el kiuj unu estis vera spertulino. Jes, tiu urbo havas vere malnovan historion, ekziston de kvar- aŭ kvincent jaroj.

Ĉiuj ŝatis. Ni vizitis malnovan fortikaĵon en Cienfuegos, vespere promenis sur la ĉefstrato Prado, vizitis malnovan teatron, ĝuis la sunsubiron el belega teraso de malnova restoracio kaj gustumis trinkaĵojn. Vere bela loko kaj bonega etoso.

La sekvan tagon ni atingis Trinidad-on. La urbon prezentis al ni Lazaro, la sola esperantisto tie. Li tuj la unuan vesperon grimpigis al ni monteton. Tie situis niaj dometoj, ĉar li volis, ke ni sentu la vesperan etoson de la urbo. Kantado, muzikado





aŭdeblis de ĉiu korto, kie estis restoracio. Post hora vagado, ankaŭ ni sidiĝis en unu kaj trinkis tipajn kubajn koktelojn, kiel *piña-colada* [pinja kolada], *cuba libre* [kuba libre], aŭ *mojito* [moĥito].

La historia kono de Lazaro impresis nin ĉiujn. Li facile rakontis pri la iama vivo de la loĝantoj, pri religio kaj *oriŝoj* (afrikaj dioj), pri la sorto kaj vivo de sklavoj, pri la iamaj loĝantoj de la insulo – la indiĝenoj. Ĝuste tiu temo estis interesa, ĉar kelkaj pensas, ke la historio de Kubo komenciĝis per la alveno de Eŭropanoj.

Indiĝenoj vivis tie, kiam la Hispanoj malkovris la insulon, sed tiuj praloĝantoj estis tuj disigitaj, kaj tiel malfortigitaj, ke ili malaperis iom post iom. Ni

vizitis historian muzeon. Ĉe la fino de la vizito, Lazaro montris al ni foton de urbaj konsilantoj de Trinidad en la 19-a jarcento. Lia praavo el la patrina flanko estis unu el tiuj.

Lazaro vojaĝis kun ni la postan tagon ĝis la proksima valo de Sancti Spíritus [sankti spíritus], kie ni vizitis koloni-epokan lokon. Tie loĝis, laboris kaj suferis sklavoj. Ili laboris sur sukerkanaj kampoj, je malhomaj kondiĉoj. Ili estis konsiderataj kiel bestoj ĝis 1860, kiam finiĝis la sklavismo en Kubo.

Ni vizitis lokon, kies nomo signifas « muelilon ». Temas pri ronda, ekstera ejo, kun tegmenta konstruaĵo, en kies mezo estas premilo de sukerkano. Mi povis mane turni la muelilon, por iom aktori esti sklavo, kiu puŝas pezan, dikan stangon, rondirante ĉiam en la sama cirklo. Post du tiaj turnoj jam komencis flui dolĉa suko. Dum du sklavoj turnis la muelilon, tria sklavo, kiu enmetadis sukerkanan tigon en la muelilon, devis aliaflanke de ĝi repreni la presitan tigon de sukerkano kaj denove remeti ĝin sub la premilon. La saman tigon sklavoj devis plurfoje denove remeti por elpremi la tutan sukon ĝis la lasta guto, ĝis restis nur fibra sukerkano. Tian sukon oni boligadis por ricevi melason.

Ni poste trinkis la dolĉan sukron, miksitajn kun glacipecoj. Estis bongusta refreŝigo. Ni adiaŭis Lazaron kaj li deziris al ni vojaĝantojn ankoraŭ interesajn kaj agrablajn momentojn.

Ni atingis novan urbon, kiu nomiĝas Santa Clara [santa klara]. Ĝi estis la centro de la Kuba revolucio. Oni nomas ĝin urbo de Ĉe Gevara. En Santa Clara troviĝas muzeo pri li kaj lia maŭzoleo. Ni nur preterpasis la monumenton, ĉar estis planite viziti ĝin la postan tagon.

En ĵaŭdo ni unue vizitis fabrikan de kubaj cigaroj, kiujn oni manĝas faras de 40 jaroj. Tie ducent laboristoj dum kvin tagoj ĉiusemajne zorgas, ke ĉiu cigaro estu tradicie bonkvalita. Unu sola persono faras la cigaron de komenco ĝis fino. Ĉiu cigaro devas havi ne nur bonkvalitan tabakon, sed ĝi devas esti premita, rulita, mezurita kaj

finpreparita laŭ preciza normo. Depende de la tabako kaj procezo, foje la cigaro havas apartan parfumon. Ĉiuj tiuj cigaroj estas eksportataj al eksterlando, ĉefe al Eŭropo – interalie al Francio kaj Hispanio. Ni havis la rajton observi tiujn lertajn manojn. Laboristo unuope prenas tabakan folion, metas ĝin sub pezan premilon, kaj poste la glatan tabakfolion eltranĉas laŭ necesa formo, plenigas la folion per rulitaj folioj jam antaŭe klasifikitaj. Ne nur

dikeco, longeco kaj

aromo gravas, sed ankaŭ kiamaniere ĝi brulas : ĝi devas esti perfekta. Tion kontrolas spertulo, kiu kompreneble havas ilojn por la kontrolo. Aliflanke de profesiaj laboristoj, samtempe troviĝas lernantoj, kiuj ricevas daŭran instruadon ĝis



Kongresi en alia lando donas eblecon lerni pri nova kulturo

pliperfektigo kaj poste enpostenigo.

Post tiu vizito, pro la pluvo ĉiuj kuris aŭ rapidis al la aŭtobuso.

Ni eksciis ankaŭ, ke la muzeo pri Ĉe povus esti fermita pro la pluvo. Tamen, ni veturis tien kaj ĝuste tiun respondon ni ricevis : ni vere ne povis eniri. Je nia demando pri kialo, oni informis nin, ke dum pluvtago la humideco fariĝas tiom alta, ke ĝi povus damaĝi multajn dokumentojn, se la publiko povus eniri.

Ni veturis al la hotelo kaj poste havis liberan tempon por ripozi aŭ viziti la urbon. Kelkaj piediris ĝis la trajna stacio, kelkaj vizitis historian muzeon, aliaj galerion en la centro, aŭ ni simple iom vagis por senti la etoson.

Kiam noktiĝis, la arboj de la ĉefa placo pleniĝis je nigraj birdoj, el tri malsamaj specioj (laŭ mia edzo Normando), kiuj tiom laŭte kriis, ke oni malfacile povis aŭdi dum nia vespera promeno.

Matene je sunleviĝo ni volis revidi la birdojn kaj

kalkuli ilian nombron. Ili estis certe pluraj miloj, kiuj iom post iom forflugis.

Dum nia lasta mateno en Santa Clara ni nur havis tempon veturi ĝis la muzeo pri Ĉe Gevara kaj

almenaŭ fotiĝi antaŭ la tiea monumento. Bedaŭrinde, ni ne plu povis viziti la muzeon tiun vendredon. Ni devis forlasi la urbon pro longa vojaĝo, kiu atendis nin ĝis Havano, kiun ni devis atingi tagmeze, por trafi buson veturigontan nin al la urbo Varadero antaŭ la vespero. Kaj kunvojaĝantoj el Koreio havis posttagmezan flugon hejmen.

Jam estis tagmezo. Restis al ni pli ol 20 km ĝis Havano.

Normando kaj mi devis akcepti, ke ni povos ekbusi direkte al Varadero nur je la 17a horo. Sed nia ĉiĉerono Alberto ĉiam facile

adaptiĝis al iu nova situacio, kiam la plano devis iom ŝanĝiĝi. En tiu rezigna momento Alberto venis al ni kaj anoncis, ke junulo de la Kuba Esperanto-Asocio jam iris aĉeti la busbiletojn kaj atendos nin ĉe la busa stacidomo, kien nia postkongresa buso



veturigos nin rekte. Tie la junulo transdonos al ni la busbiletojn kaj ni devos nur repagi al li kaj rapide enviciĝi por eniri la buson je la 13a horo.

Alberto estis kiel anĝelo, kiu ebligis al ni trafi la ĝustan buson. Ni feliĉis. Imagu : salutante niajn postkongresajn geamikojn, ni devis rapidi. Ili ĉiuj estis ĉe siaj fenestroj por saluti nin. Kia bela fino, kvazaŭ en filmo, sed ĝi ja, vere okazis al ni.

Alberto, akompaninte nin en la bushaltejon, tuj rekonis la junulon, prezentis lin al ni, kaj poste ĉio iris glate. La loka aŭtobuso estis plena, tamen du lastaj seĝoj estis liberaj por ni.

Tiel, kiam ni atingis Varadero, la suno estis ankoraŭ sufiĉe alta. Ni rapide trovis nian gastejon, surmetis ban-kostumojn kaj iris ludi en la mar-ondojn en agrable varma oceano. Varadero ofertas sablajn plaĝojn sur 35 km marborde.

La postan matenon, estis jam tempo reveni al Montrealo post dusemajna restado en bela kaj varma Kubo, kiu havas, dise tra la lando, multnombrajn grupojn de aktivaj esperantistoj. Vere mi havis grandan plezuron ĉiam uzi Esperanton kaj senti min komprenata en tiu verda kuba movado.

## *En Vero* invitas kunlaborantojn !




En februaro, ESK havis specialan gaston David Bertet, la prezidanto de la organizo kun Esperanto-nomo, *En Vero* (neniu hazardo !). La organizo similas al *Amnesty*

*International* : ĝi helpas liberigi false akuzitajn homojn tra la mondo. Se *Amnesty International* fokusiĝas pri politikaj kazoj kaj minirotataj grupoj, *En Vero* ofte prenas senesperajn kazojn (seriozajn, sed nepolitikajn kaj ne altprofilajn kazojn — alivorte, la kazojn, kiuj ne kreas multe da bruoj en la gazetaro). David decidis uzi Esperanton ĉar ĝi iras kun la idealoj de la organizo, kaj nun li ŝatus ankaŭ enkonduki Esperanton en la retejon de la organizo kaj li serĉas volontulajn tradukistojn (de la franca, angla kaj hispana) en Esperanton. Vizitu ilian retejon [www.en-vero.org](http://www.en-vero.org) kaj kontaktu lin se tio interesas vin ! [president@en-vero.org](mailto:president@en-vero.org)

# Malpli oftaj fundamentaj vortoj 7

*Francisko Lorrain*

Iam kaj tiam oni renkontas fundamentan radikon, kiun ni povus pli ofte uzi. Jen la sesa ero de kroniko prezentanta ĉiufoje kelkajn malpli ofte uzatajn fundamentajn radikojn. La difinoj kaj ekzemploj estas ĉerpitaj el *La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto* (Paris, Sennacieca Asocio Tutmonda), kiu markas ĉiujn fundamentajn vortojn per stelo ★. Komentoj miaj aperas inter rektaj krampoj [ ]. Alta <sup>Z</sup> indikas zamenhofan citaĵon aŭ vorton, alta <sup>X</sup> citaĵon el la *Hebrea Biblio* (Malnova Testamento) laŭ la Londona eldono, alta <sup>B</sup> citaĵon de K. Bein (« Kabe »).



★ **ĉagren/i** (tr) Kaŭzi malplezuron al iu, kontraŭstarante al ties intencoj aŭ deziroj : *tiu perdo de tempo min ~is ; la pupo aspektis tre malkontenta, ĉar ĝin ~is, ke ĝi ne devas resti en sia lito<sup>Z</sup> ; sed dankon neniu el ni ricevas : tio ~as !<sup>Z</sup> ; se ni ne trovos pli bonan esprimon, tio ne devas nin ~i<sup>Z</sup>. ☞ inciti, tedi. ~o. Sento de tiu, kiu estas ~ita : ĉe ~o de la koro<sup>Z</sup> ; mi ne estas tia homo, kiu faras ~on al belulinoj<sup>Z</sup> ; bedaŭro k ~o ŝuldon ne kovras<sup>Z</sup> ; kia ~o ! (→ domaĝe) ; la ~o, kiun povus kaŭzi al mi la riproĉoj de miaj gepatroj<sup>Z</sup> ; li koleris k havis grandan ~n<sup>X</sup> ; venas*

*~o sen granda peno<sup>Z</sup>. ~a. Enhavanta aŭ spertanta ~on : [...] diris la kliento kun ~a rido<sup>Z</sup>. ~iĝi. Eksenti malplezuron pro la ĝenoj, malhelpoj, oponoj, kiujn oni renkontas : li kutimis al la orienta malrapideco, k li tute ne ~iĝis k ne perdis la paciencon<sup>B</sup> ; la pupo rompiĝis k la infano forte ~iĝis.*

[Atentu, ke, kiel ĉe la franca verbo « chagriner », la signifo de « ĉagreni » estas « kaŭzi ĉagrenon », ne « senti ĉagrenon » (tion esprimas « ĉagreniĝi »).]

★ **ĉikan/i** (tr) **1** Intence fari al iu maljustajn ĝenojn, malagrablaĵojn, malhelpojn, por sentigi al li/ŝi sian superecon : *la malnovaj anoj de milita lernejo kutimas ~i la nove alvenantajn ; la maljuna fraŭlo ~adis siajn najbarojn.* **2** Subtilaĉi, pedante diskutaĉi, por venkigi sian malpravan vidpunkton : *la advokato ~is la tamen evidentan akuzon.* ☞ *ĉagreni, intrigi, turmenti.* → *haro.*  
[Kial *haro* ? Ĉu nur pro la esprimoj *disfendi, dissplitigi harojn* ? Notu, ke tiu radiko havas iomete malsaman signifon ol la franca *chicaner.*]

★ **degel/i** (ntr) Likviĝi fare de la varmo, fandiĝi (pp glacio) : *sur altaj montoj la neĝo neniam ~as<sup>B</sup>* ; (sensubjekte) *surmetu botojn, ĉar ~as.*  
[Notu, ke « geli » ne estas Esperanta verbo. La signifon « maldegeli » esprimas pli rekte verboj kiel *frostiĝi, al frostiĝi, glaciĝi.*]

★ **deput/i** (tr) Elekti k sendi kiel reprezentanton en parlamenton. ~**ito**. Homo, elektita kiel politika reprezentanto : *ĉambro de la ~itoj.*  
[Temas pri verba radiko ! Ĝi estas bedaŭrinde maloftege uzata, krom en la participo ~*ito.*]

## La unua KER-ekzameno en Montrealo 16an de junio 2018

**Ĉu vi scipovas Esperanton? Ĉu vere? Je kiu nivelo? Jen okazo konfirmi vian mastrumadon de nia kara lingvo.**

Okazos baldaŭ, la 16-an de junio, mondskala ekzamensesio pri Esperanto, laŭ la fama Komuna Eŭropa Referenckadro (KER), kiu regas ĉiujn lingvojn en Eŭropa Unio. Vi povas nun aliĝi al tiu tre serioza ekzameno per simpla retmesaĝo al Suzano la dua (roy\_248@hotmail.com), kiu respondecas pri la sesio en Montrealo. Iom da stipendi-subteno haveblas. **Facebook-paĝo** : <http://tiny.cc/ker>. **Pliaj informoj** : [edukado.net/ekzamenoj/ker](http://edukado.net/ekzamenoj/ker). **Video** : <https://youtu.be/r2jgomyxwBg>





## Rigardo en la pasintecon

Du esperantistoj, Jacques Gaucher (kvara de maldekstre, dua vico) kaj Trefleo Mercier (kvina de dekstre, dua vico), kiu ambaŭ aktivas ankoraŭ, estas sur la foto prenita en novembro 1970 en Montrealo (dum trejnado de Air Canada).

## Esperanto kaj Vikipedio

Kelkaj membroj de ESK paroprenis en la ateliero pri Vikipedio ĉe la Nacia Kebekia Biblioteko kaj Arĥivoj (BANQ). La atelieroj okazas ĉiumonate, kaj la sekva ateliero estos la 10-an de majo, 2018. Ĉiuj bonvenas ! Aparte bezonatas helpo krei kaj plibonigi artikolojn pri Kebekio kaj Montrealo Esperante en la preparoj por la UK-2020 !



## Meksikaj gastoj ĉe montreala kunveno

18 personoj ĉeestis martan renkontiĝon en Vego! Ni havis du gastojn el Meksiko, Ulises Franco kaj Edgar López Borja, kiuj ĝentile kunportis por ni diversajn bongustaĵojn!

# Esperanto-renkontiĝoj

19 — 21-a de majo 2018 : MeKaRo	Tririvero, QC
28-a de julio — 4-a de aŭgusto 2018 : UK	Lisbono, Portugalio
4 — 11-a de aŭgusto 2018 : IJK	Badaĥozo, Hispanio
6 — 8-a de oktobro 2018 : ARE	Silver Bay, NY
Somero 2019 : UK	Lahti, Finnlando
Somero 2020: UK	Montrealo, Kanado

## Montrealaj Esperanto-Kunvenoj

Ni renkontiĝas la duan kaj la lastan\* vendredon de la monato, vespere, krom dum la somero. La renkontiĝoj okazas en la restoracio Resto Végo (suba saloneto) : [1720 rue Saint-Denis](#), metroo « Berri-UQAM ». Manĝo je la 18 h, babilado ekde 19:30 h. Speciale por lernantoj, Suzanne Roy foje okazigas ludecajn paroligajn kursojn, inter la 18:00 kaj la 19:00 en la sama tago, en la kafejo La Récréation, 404 rue Ontario Est. Post la paroliga kurso la grupo pluiras al Resto Végo. Bonvolu kontroli nian horaron ĉe la retejo de ESK : [esperanto.qc.ca/eo/kalendaro/](http://esperanto.qc.ca/eo/kalendaro/) aŭ vizitu nian FB-paĝon : [facebook.com/EsperantoQuebec](https://facebook.com/EsperantoQuebec). Kontrolu ilin ankaŭ por vidi la datojn de renkontiĝoj en Kebeko !

\* kutime la lasta vendredo estas la kvara vendredo de la monato, sed, se estas kvin vendredoj en la monato, ni renkontiĝas la kvinan vendredon.

## Rencontres d'espéranto à Montréal

Les rencontres ont lieu les deuxième et dernier\* vendredis de chaque mois, sauf pendant la période estivale. Le lieu des rencontres est le Resto Végo (petit salon en bas) : [1720 rue Saint-Denis](#), métro Berri-UQAM. Souper à 18 h, discussions à partir de 19 h 30. Spécialement pour les débutants, Suzanne Roy parfois anime des cours de conversation ludiques, de 18 h à 19 h, le même jour, au café La Récréation, au [404 rue Ontario Est](#). Après le cours de conversation, le groupe rejoint celui du Resto Végo. Veuillez vérifier le calendrier sur le site de la SQE: <http://www.esperanto.qc.ca/fr/calendrier/> ou notre page FB: [facebook.com/EsperantoQuebec](https://facebook.com/EsperantoQuebec) (pour Montréal ou Québec).

\* Le plus souvent, le dernier vendredi du mois est le quatrième, mais, s'il y a cinq vendredis dans le mois, la rencontre a bien lieu le cinquième.



# Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junio, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la autoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

**Redaktado kaj grafiko** : Yevgeniya (Ĵenja) Amis (riverego(ce)esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado** : Silvano Auclair kaj Francisko Lorrain. **Estraranoj de ESK** : Nicolas Viau (prezidanto), Suzanne Roy (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Joel Amis (konsilanto), Normand Fleury (konsilanto).

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

**Rédaction et graphisme** : Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca). **Correction** : Sylvain Auclair et François Lorrain. **Administrateurs de la SQE** : Nicolas Viau (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Joel Amis (conseiller), Normand Fleury (conseiller).

Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2018.08.20

6595, rue Briand, Montréal H4E 3L4 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca

**Vizitu nian retejon !**

**Visitez notre site web !**

[www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca)



Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi :

**[www.pasportaservo.org](http://www.pasportaservo.org)**

Vi povas ankaŭ kontakti Jed-on Meltzer <jedmeltzer@gmail.com>, kiu estas la peranto por Kanado.